

sub la suda kruco ★
junio 2018

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25[2] numero 131 junio 2018

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de aŭgusto 2018

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2018 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Mevo sur signo, Queenscliff Viktorio

- 
- 5.** Instruado de Esperanto per Skajpo
 - 6.** La Mama
 - 7.** La stranga moderna arto de muzikfarado
 - 8.** D-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA, akuzita pri protesto
 - 9.** Komentoj de partoprenantoj de la tri landa kongreso en Bekasi, Indonezio
 - 15.** Arakna kaj Atena
 - 16.** Kondolencoj por Doug Everingham
 - 18.** Pikniko dum la ANZAK-tago
 - 20.** La Spuroj de Vivo
 - 22.** Tiel funkcias mia loka registaro
 - 23.** La Interna Ideo
 - 26.** La plej granda saniganto de la lasta jarcento?
 - 29.** Vorta ŝtuparo

junio, du mil dekok

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

Jen la Junia eldono de ESK kaj ne estiĝis la aŭguro, ke ĝi eble ne plu aperos post tiu en Marto. Do tiuj vortoj de David en la Decembra 2017a eldono, “Vi havas en viaj manoj eble la antaŭlastan numeron de ESK.” instigis min agi kaj provi redakti la gazeton. Dankon al vi David.

David Ryan redaktis la gazeton kun helpo de aliaj. Kam Lee, Robert Budzel kaj Joanne Johns helpis inter Septembro 2011 kaj la lasta (sed ne vere lasta) en Marto 2018. Do multajn dankojn al vi David pro via diligenta laboro dum tiuj jaroj. Mi esperas, ke vi daŭre kontribuos al ESK per verkoj pri viaj interesaj mondvojaĝoj.

La oficiala organo de AEA foje malaperis dum la historio de AEA Komence "The Australian Esperantist" aperis en 1908-09 dek du fojojn, sed ne ĝis 1920 reaperis oficiala gazeto nomita, "La Suda Kruco". Tiu daŭris ĝis 1934 kiam refoje ĝi malaperis en epoko de neaktiveco de AEA. En 1941 naskiĝis "La Rondo" kiu daŭris ĝis nomŝanĝo

en 1958 al "The Australian Esperantist." En 1992 la nomo "Esperanto sub la Suda Kruco" estas adoptita kaj tiu nomo restas ĝis hodiaŭ.

Dum tiuj jaroj estis elstaraj redaktoroj: Frank Banham 1929-34 kaj 1941-74 -nekredeble, ĉu ne?; Herbert Koppel 1974-88; kaj Donald Broadribb 1989-2008. Mi Esperantistiĝis dum tiu redaktperiodo de Donald, kiam ĝi aperis ĉiun monaton.

Do dankojn al tiuj kaj la redaktistoj de la pasintaj dek jaroj: Chris Krägeloh, Șandor Monostori, Kam Lee, Robert Budzel kaj refoje David Ryan kun Joanne Johns. Ĝo restas kiel komponisto kaj pro tio mi dankas al ŝi. Mi preferas uzi la vorton ‘komponi’ antaŭaŭ ‘komposti’ ĉar la formato estas tre arte kaj bele farita de Ĝo. Eble ‘arte formati’ estas pli moderna termino.

Do mi esperas, ke mi plenumos la taskon kontentige, sed memoru, ke mi nur ricevas la artikolojn por trakribri kaj arigi ilin. Estas via tasko verki ilin.



Instruado de Esperanto per Skajpo

MARJA NIELSEN (SUDAŬSTRALIO)

Mi estis instruistino dum multaj jaroj. Estas popoldiro: “iam instruistino, ĉiam instruistino.” Do, nun mi instruas miajn nepinojn per Skajpo.

Miaj nepinoj loĝas en Kanbero kaj mi loĝas en Whyalla, Sudaŭstralio. Sekve la sola maniero por instrui ilin estas per Skajpo. La akustiko de Skajpo ne ĉiam estas bona, sed ni sukcesas. Kelkfoje ni uzas la telefonon por aŭskulti kaj la komputilon por vidi.



Mia filino hejminstruas siajn filinojn kaj mia instruado de Esperanto akordas kun la aliaj lecionoj. Mi instruas mian pli junan nepinon, Phoebe (ŝi estas okjara) kvin fojojn kaj la alian, Hattie (ŝi estas dekjara) du fojojn semajne. Ili havas propran komputilon sur propra skribotablo.

Mi preparas lecionojn ĉiutage kaj ili devas fari hejmtaskojn post la leciono.

Tamen, estas tre granda problemo.



Ĉiaj libroj, kiujn mi havas por lerni Esperanton estas verkitaj por plenkreskaj personoj. Mi havas nur unu libron por infanoj, “Esperanto por Infanoj” de G Gladstone Solomon. Ĝi estas tre malmoderna kaj ne havas kolorajn bildojn. Mi serĉis la interreton sed la libroj estas multekostaj kaj mi ne scias, ĉu ili estas taŭgaj. Do mi devas fari miajn proprajn lecionojn por ilia nivelo.



Mi faras “vortkartojn” kun bildoj de vortoj, kaj malgrandajn frazojn ili lernas.

Mi faras ekzercojn, kaj sendas ilin al mia filino. Ŝi presas ilin kaj post tio miaj nepinoj faras la laboron, kaj montras ĝin al mi per Skajpo, aŭ mia filino skanas ĝin kaj retpoŝte sendas ĝin. Tiam dum la leciono miaj nepinoj kaj mi povas diskuti la taskojn.

Dum la lecionoj mi skribas sur paperon la novajn vortojn kaj frazojn kaj montras ilin al miaj nepinoj. Ili havas tempon por kopii en siaj kajeroj kaj laŭtlegas la vortojn kaj frazojn al mi.

Se estas iu, kiu havas kelkajn ideojn por instrui junajn infanojn, mi tre dankeme ricevos ilin.

La Mama

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Ĉiu melburnano certe konas tiun malgrandan teatron en Carlton. Kiam Betty Burstall kaj ŝia edzo Tim aĉetis ĝin en 1967 ili deziris provizi malmulte koston distraĵon al la neriĉaj loĝantoj de la kvartalo kaj oportunon por la aktoroj diskonigi sian talenton al la publiko. Multaj nun famaj artistoj ekis sian karieron tie. Profito ne estas la celo de la direktoroj. En la intimeco de la malgrandaj ĉambroj eblas malkovri avangardajn teatraĵojn kaj poste diskuti kun la artistoj aŭ la aliaj ĉeestantoj, kune trinkante.

Kia ŝoko en la mateno de dimanĉo la 20a de majo 2018 ekscii ke brulis

la konstruaĵo. La fajrobrigadistoj ne povis ĝin savi.


Tamen solidareco tuj organiziĝis. Lokoj estis proponitaj por ke la spektakloj spite de la cirkonstancoj estu prezentataj.

La kialo de la incendio ne estas ankoraŭ konata: ĉu difektita elektra drato? La posedantino anoncis, ke la asekuro ebligis renovigon de la konstruaĵo.

Do teatroamantoj gajiĝu ĉar tiu tre speciala teatro ankoraŭfoje venkos la baton de la sorto.

La stranga moderna arto de muzikfarado

JOANNE JOHNS (MELBURNO)



Vere, por krei muzikon oni nur bezonas ion simplan kiel la propra voĉo, aŭ du bastonetoj por kunbati. La historio de muzikfarado estas tre interesa sed eĉ en la pasintaj cent jaroj multo ŝanĝiĝis.

Ofte, novaj teknologioj instigas ŝanĝon, ekzemple kiel elektro influis la gitaron, kaj fruaj komputiloj influis la pianon. Sed ne nur temas pri la muzikiloj mem - la registrado ankaŭ profitis de novaj teknologioj kiam ĝi evoluigis de analoga ĝis cifera. Kaj nun eĉ publika ludado de muziko havas novan formon, kaj oni povas vidi muzikiston premi butonojn de ilo kiel la suba, por ne nur ludi diversajn ciferajn muzikilojn aŭ sonpecojn, sed ankaŭ por regi ĉiujn imageblajn karakterojn de tiuj.

Ĉi tiu nova revolucio (ebligata de la rapida evoluo de komputiloj) komencis en 2001 per la eldono de softvaro de Ableton, kiu nomiĝas *Live*. Ĝi estis nek la nura

nek la unua aŭdia softvaro sed ĝi rapide populariĝis pro ĝia unika interfacoj kaj ĝia "ĉio-en-unu" metodo. En *Live* oni povas fari ĉiun parton de la muzikumado - verkadon, iteraciadon, registradon, ludadon, aranĝadon, miksadon - eĉ la kreadon de novaj muzikiloj.

Samkiel saĝaj poŝtelefonoj anstataŭigis multajn aliajn ilojn (kiel kalkulilo, fotilo, taglibro, kalendaro, lumigilo, horloĝo ktp), *Ableton Live* anstataŭigas muzikilojn kaj ĉiujn ilojn por ŝanĝi iliajn sonojn, studiojn, sonspacajn ĉambrojn, kaj multe pli.

Live estas vaste uzata por moderna muziko kaj ĝiaj iloj influas la novajn stilojn de muziko kiuj estas kreataj. Ĝi estas tre potenca softvaro, kaj tio kion vi povas krei per ĝi estas nur limigata de via imagoj - mi lastatempe vidis filmeton en YouTube pri kanto kreita en *Live* uzante nur sonpecojn de la kuirado de krevmaizo!



Ableton Push 2



Ableton Live 10

D-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA, akuzita pri protesto

TRADUKIS JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Du homoj deklaris sin kulpaj pri malestimo al kortumo pro transiro de la limo ordonita de la kortumo dum protestado kontraŭ la pligrandigo de la Trans-Monta Naftodukto en Brita Kolumbio, Kanado.

Unu akuzito, Tara Rose, universitata studento, estis unu el la malmultaj, kies procesdato povis esti prokrastata. Tamen ne ĉiuj estis tiom bonŝancaj. D-ro Mark Fettes, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, havos jarkunvenon en Portugalio la saman daton kiel lia proceso. Juĝisto Kenneth Affleck de la Plejsupera Kortumo de B.K. neis lian peton prokrasti ĝis oktobro.

Pro tio, Fettes diris al la gazeto National Observer, ke lia sola eblo nun verŝajne estos deklari sin kulpaj. Tamen li ne kredas, ke kriminala akuzo taŭgas por rompado de la ordono. "Mi estis tie pro mia konscienco. Post jaroj da laborado kun indiĝenaj popoloj en Kanado, mi sentis, ke por esti fidela al miaj konvinkoj, mi devis esti tie. Mi ne kredas, ke tio necesigas kriminalan akuzon."

(Bazita el artikolo en National Observer, la 8-an de majo 2018. Por legi la artikolon iru al bit.ly/MFakuzita.)

La 12-an de majo 2018, Sandor Horvath, prezidanto de AEA, skribis al Mark Fettes:

"Nome de la Aŭstralia Esperanto-Asocio mi ŝatus esprimi mian admiron

pro via kuraĝa paŝo kontraŭbatali la pligrandigon de la Trans-Monta Naftodukto kaj samtempe subteni la lokajn indiĝenajn grupojn, kies lando estas uzita aŭ detruita... Ni esperantistoj ofte parolas pri la neceso partopreni aliajn sociajn movadojn. Vi estas bonega rolmodelo."

Mark respondis:

"Mi elkore dankas pro via mesaĝo de subteno. Kompreneble mi partoprenas en la protestoj kaj la proceso mianome, ne kiel oficiala reprezentanto de UEA. Tamen la aferoj estas profunde kunligitaj por mi, kaj mi ĝojas, ke ankaŭ vi komprenas ilin tiel."

La 103-a Universala Kongreso okazos en Lisbono, Portugalio la 28-an de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018. La kongresa temo estos *Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?*



Komentoj de partoprenantoj de la tri landa kongreso en Bekasi, Indonezio

pli da artikoloj troviĝas ĉe <http://aea.esperanto.org.au/komentoj-pri-bekasi-kongreso/?lang=eo>
danke al Jonathan Cooper

Kompreneble, ne ĉio estis perfekta. Ekzemple, bedaŭrinde ofte ni ne kune manĝis, simple ĉar la manĝaĵo en la hotelo estis tro multekosta por la indonezianoj kaj orient-timoranoj. La ĝenerala malegaleco en la mondo speguliĝis ankaŭ en tiu ĉi kongreso. Tamen, mi diras, ke la kongreso estis sukcesa. La komentoj de la partoprenantoj estis ĉefe pozitivaj.

Parto de la Raporto pri Bekasi de la prezidanto de AEA Sandor Horvath

Saluton. Mi estas Mateus de Sena kaj mi estas komencanto. Dum la kongreso mi ŝatis la prezentadojn de Heidi,

Sandor, Carlos kaj Albert, ĉar ili donis bonajn novaĵojn kaj samtempe mi lernis novajn vortojn. Mi tre ĝuis renkonti novajn amikojn el diversaj landoj. Kaj mi ankaŭ tre ĝuis nian ekskurson. Estis mia unua kongreso.

Dankon de Mateus

Mi multe ŝatis la etoson kaj amikecon de ĉiuj kongresanoj kaj dankas la organizantojn pro tiu mirinda kaj fruktodona kongreso. La partopreno de la gejunuloj el tiu regiono kaj ilia kunlaboro estas esperiga, same kiel la kunlaboro de indonezianoj, orient-timoranoj, filipinanoj, aŭstralianoj,





novzelandanoj kaj alilandanoj. Dankon al ĉiuj. Daŭrigu en la amikeca kaj frata vojo por Esperanto.

Carlos

Ĝenerale interesa. Bona oportuno renkonti homojn de aliaj landoj. Refoje, la “okcidentaj” landoj provizis la maljunulojn, dum la aliaj provizis la junulojn. Kvankam mi ĝuis la lukson de la hotelo, mi opinias ke ne tiom luksa hotelo estus pli taŭga, por ke oni ne dividu la ĉeestantojn, tiel klare en du grupojn: la pagipovan kaj la nepagipovan. Mi ne tre ŝatis la viziton al “mini Indonezio” ĉar estis tro da aŭtomobiloj ĉie. Pro ŝanĝoj en la programo mi alvenis malfrue kaj mistrafis spektaklojn. Mi certe preferis la art-galerion. Estonte, mi petas pensu

pri pli da eblecoj por interŝanĝoj inter la monhavantoj kaj nemonhavantoj.

Mi vere dankas la organizantojn (ĉar mi scias, ke kutime estas la sama malgranda nombro de diligentaj laborantoj).

- Mi ĝuis la ludojn dum la interkona vespero.
- La individuaj prelegoj estis bonaj.
- La sen-aŭta marŝado estis miraklo.
- Mi ĝuis finfine vidi la lokajn loĝantojn sur la strato, ludantajn, ridantajn, rajdantajn bicikle, marŝantajn kaj babilantajn.
- Por mi la malpura aero en la urboj tutcerte restas en mia memoro kiel bona memorigo, ke mi bonŝancas loĝi en puraera loko.
- La plej bona sperto estis babili kun homoj de aliaj landoj kaj amikiĝi kun ili.

Sennoma

I didn't understand what was happening most of the time, but I enjoyed it. A good program. The illustrated presentations were much







easier to follow for me as I could make some connections with the words and the pictures. Great camaraderie amongst participants. [Mi ne komprenis pri kio okazis la plej grandan parton de la tempo, sed mi ĝuis ĝin. Bona programo. La ilustritaj prezentadoj estis multe pli facilaj sekvi por mi, ĉar mi povis trovi iujn rilatojn kun la vortoj kaj bildoj. Bona kamaradareco inter kongresanoj.]

Greg Jeffs

Mi nomiĝas Tiwi. Mi estas komencanto. It's too hard for me to express all my joy with Esperanto, but I'll keep learning and improving. La kongreso estis interesa. Mi lernis Esperanton de multaj homoj. Mi ankaŭ akiris novajn amikojn. Mi amis tion. Multajn dankojn!

Tiwi

Ĝenerale estis bone, sed mi pensas, ke estis multe da malsameco de aktivecoj inter la junuloj kaj maljunuloj. Mi vere sentis la diferencon de la "dua klaso". Mi pensas, ke la Esperanto-movado estas en periodo de transiro, ĉar multe da junuloj nun Esperantiĝas. Devas esti plano por ĉiuj kune en la venonta kongreso. La mono estas grava afero por multaj. La riĉuloj devas pli subteni la malriĉulojn.

Sennoma

Mia nomo estas Eĉa. Hodiaŭ mi sentas min malĝoja. Kial finiĝos ĉi tiu tago? Tamen, mi estas tre feliĉa konatiĝi kun vi el Koreio, el Aŭstralio, el Belgio, el Novzelando, el Orienta Timoro kaj el Hispanio. Unue mi pensis, ke estos malfacile inter vi.







Mi neniam forgesos tiujn momentojn.
Mi lernis Esperanton plu, do nun mi
povas paroli kun vi. Mi amas vin ĉiujn.
Eĉa

La trilanda kongreso estas blovo de freŝa aero por mi. Tio ĉi estas mia sesa kongreso, sed la unuaj kvin estis precipe por maljunuloj, kun kiuj mi havas kompreneblajn diferencojn, ĉu pri vidpunktoj aŭ spertoj, ktp. Do, estas mia unua fojo partopreni internacian Esperanto-aranĝon, kies partoprenantaro konsistigas plejmulte junulojn. Vidi per miaj du okuloj, ke la esperantista junularo kaj en Indonezio kaj Orienta Timoro vere daŭre kreskas, kaj, ke ili florigas kompetentajn movadanojn, plifortigas la fajron en mia

koro. Mia ĉiama aserto, ke Sudorienta Azio estas la espero de nia movado estas fakte tute vera. Ni ankoraŭ devas multe pli labori por antaŭenigi la jam komencitan sukceson. Mi dankas al ĉiuj junaj indonezianoj kaj orienttimoranoj, kiuj havis la entuziasmon montri siajn lertojn kaj konojn dum diversaj programeroj, kaj kiuj ankaŭ kun intereso interagis kun mi. Nu, mi estas ĝenerale timema homo, sed la pasio interagi fontas el tiu energio montrata de ili. Ĉiam antaŭen!

Aŭdiaŭa mesaĝo de Albert Stalin Garrido (Filipinoj)

Arakna kaj Atena

TOM O'GRADY (KVINSLANDO)

En antikva Helenujo estis eminenta familio de teksistoj. Iufoje fama tinkturistino naskis bebinon, kiu ricevis la nomon Arakna. Tiu etulino, eĉ en knabineco, fasciniĝis per la manieroj laŭ kiuj koloritaj fadenoj povas fariĝi belaj bildoj sur ŝtofo. Kaj per diligenta studado kaj praktikado dum la jaroj ŝi faris sin, dum ankoraŭ juna, bela virino, vera Majstrino de ŝpinado, teksado kaj brodado.

Ŝia famo disvastiĝis tra la regiono, kaj multaj homoj venis por vidi kiel ŝiaj lertaj fingroj manipulis navedon kaj kudrilon, kaj miri pro la brilkoloraj, vivsimilaj bildoj kiuj rapide kreskis sur ŝiaj teksiloj. Kaj ne nur homoj venis por rigardi, sed nimfoj el rojoj, rokoj kaj arboj!

Ŝia patrino foje diris, dum Arakna laboris, "Filino, Atena sendube donis al vi elstaran lertecon en la teksartoj. Vi ja devus danki al la Diino per oferoj - kaj eble Ŝi donus eĉ pli!"

Arakna kutimis respondi jene, "Panjo, mi jam diris al vi kelkfoje, mi absolute ne bezonas ion ajn el iu teoria dio, for en Olimpo!"

Iun tagon, dum ŝi teksis, kiel ofte ĉirkaŭata de admirantoj, ŝi aŭdis raŭkan voĉon, kiu laŭte vokis el la fono, "Filino, vi faras sufiĉe bone, sed vi atentu la konsilojn de la pli aĝaj. Aĝo alportas saĝon. Kaj vi devus danki al Atena, Ĉefmastrino de la Artoj!" Tie staris maljunulino, tre kurbdorsa, apoganta sin per marŝbastono.

Respondis Arakna kolere, "Mi ne volas konsilon de eluzita oldulino! Konsilu la proprajn gefilojn! Aĝo alportas stultecon kaj memorperdon. Kaj pri Atena - se ŝi aŭdacas, ŝi venu ĉi tien kaj konkuru!"

Reĝina voĉo elsonis, "ŜI ESTAS ĈI TIE." En la loko de la "oldulino" staris la splenda, alta, bela, lumodona formo de la Diino, riĉe kaj bele vestita.

Arakna estis konsternita, sed baldaŭ ŝia obstina memfido releviĝis, kaj ŝi energie helpis aranĝi la teksokonkurson. Du grandaj teksiloj estis starigitaj en la korto, kun du stakoj da iloj kaj koloritaj fadenoj.

Ek! La konkurso komenciĝis.

La brila figuro de Atena flagris ĉe sia teksilo; sur ĝi kreskis imponaj bildoj de la dioj sur Olimpo. Meze staris majeste Zeŭso, tenanta alte manplendon da fulmoj. Apude estis Pozidono kun sia tridenta lancego, Apolono kun siaj arĝenta pafarko kaj ora liro, Hefesto kun la miriga memfarita ŝildo de Heraklo, Atena mem donanta la olivarbon, ŝia plej bona donaco al homoj kaj aliaj. Ĉirkaŭe estis la dioj punataj. Impertinentaj gigantoj, monstroj kaj hominoj, kiujn ili ŝanĝis en kriĉantajn birdojn. Bordere estis linio de olivfolioj kaj fruktoj. Kia spektaklo! Ĉu io homa povus rivali ĝin?

Dume Arakna laboris, furioze rapide, ankaŭ ŝi bildigis la diojn. Sed jen! Zeŭso ĉasas Ledan en la formo de cigno, Zeŭso kaj Hera kverelas

pro liaj “sekretaj” amoj al multaj aliaj inoj, Hadeso forrabas Persefona en la submondon, beba Hefesto falas el Olimpo, ĵetita de sia patro, Apolono kaj Artemisa murdas la dekkvar gefilojn de Nioba, dipatro Kron manĝas siajn proprajn geinfanojn. Arkana ja havis sufiĉe da diaj fiagoj el kiuj elekti! Kaj tie iom da ili staris, en bela vivsimila koloro kaj ŝajna reliefo!

Ĝuste tiam venis Atena por ekscii kion atingis ŝia rivalo. En la momento kiam ŝi ekvidis tiun insultaron, kolerego kaptis ŝin. Ŝia staturo ŝvelis duoble, ŝia bela persona lumo fariĝis

malhela ruĝo; ŝi ekŝiris la ofendaĵon el la teksilo kaj eltiris ĝin en pecojn! Arakna staris mirige defia antaŭ ŝi, sed la granda figuro estis senkompata. Ŝi fingromontris al Arakna, kaj parolis: “JEN, VI ŜPINOS ETERNE!”

La bela virina korpo subite ŝrumpis ĝis ĝi estis nur nigra makuleto sur la grundo. Se oni rigardis pli proksime, ĝi estas ARANEO!

[Ŝia nomo Arakna - Angle “Arachne” - ankoraŭ vivas en la vortoj “araneo” kaj “aranoidoj” kaj en la Angla “arachnid”, “arachnoid”, “arachnophobia”]

Kondolencoj por Doug Everingham

PETER DANZER (BRISBANO)

EXCERPTS FROM HANSARD TRANSCRIPT OF CONDOLENCE FOR DOUG EVERINGHAM

Mr TURNBULL (Wentworth – Prime Minister) (14:01): *I move: That the House record its deep regret at the death, on 24 August 2017, of the Honourable Douglas Nixon Erveringham, a former Minister and Member of this House for the Division of Capricornia from 1967 to 1975 and 1977 to 1984, place on record its appreciation of his long and meritorious public service, and tender its profound sympathy to his family in their bereavement...*

Doug Everingham was born on 25 June 1923 in the town of Wauchope, New South Wales, on the North Coast. He won scholarships to Fort Street High School and later to the University of Sydney to study medicine. After

graduating, he worked for years on the front line of psychiatric institutions in Sydney. That experience instilled in him the strong belief that the mentally ill did not belong behind closed doors in institutions, as was the practice of the day. When he became the health minister in the Whitlam government, he pushed to deinstitutionalise mental health, long before that approach was broadly accepted as appropriate. He was a man ahead of his time in many ways, in particular in urging restrictions on cigarettes and alcohol advertising, going to the extent of sticking anti-smoking signs on the cigarette vending machines that were once commonplace at Parliament House.

He first entered parliament after winning the seat of Capricornia in 1967 against his brother-in-law. In his maiden speech,

he gave a passionate defence of peace, calling for openness to globalisation and more meaningful engagement with the wider world. He also singled out the great concept of the Snowy Scheme...

It was as Minister for Health between 1972 and 1975 that Doug Everingham left his mark... He was instrumental in the introduction of Medibank, which we know today as Medicare. One of his famous pet causes of the time was his campaign for simplified phonetic spelling. He would have preferred his own department, the Department of Health, to be spelt H-E-L-T-H, but, on his attempt to implement such a system, the minister received a deceptively curt letter from Prime Minister, reminding him that spelling fell outside of his responsibilities as health minister. He retired from political life in 1984 and will be remembered dearly for his good nature, his easy smile and his wit...

Mr SHORTEN (Maribyrnong – Leader of the Opposition) (14:05): I thank the Prime Minister for his words... Doug himself was a humble person, and a private one. He shunned the trappings of office. A friend who knew him well, informed me today that he was one of the last people in Rockhampton to buy a colour television. Unusually for those times, Doug was a teetotaller, and a zealous campaigner against smoking – to the point of covering the cigarette machines in Parliament House with skull-and-crossbones stickers. And, unusually for any time, he was passionate about Esperanto and spelling reform. Doug held the idea that, if everyone could speak the same language, then we would be free of the misunderstandings that fuel conflict.

He thought this was a great path to world peace. When he was asked by the author of *Who's Who* to list his interests, he replied, 'semantics, interlinguistics, pasigraphies, symbol systems and spelling reform. Throughout his life, he championed phonetics and the removal of extraneous vowels; indeed, he wanted to remove the 'a' from his own title as Minister for Health. He would often write to his constituents and his colleagues using Esperanto. Esperanto, of course, relies on phonetics, so Prime Minister Whitlam – himself no stranger to the intellectual or the exotic – would sometimes send up his colleague by writing him notes addressed to D-U-G and signing his own name as G-O-F...

In conclusion, Mr Speaker, when you look back at the record of Doug Everingham's speeches in this place, the overwhelming majority focused not just upon health but also upon the disadvantage, the poverty and the poor health suffered by Aboriginal Australians. He was someone who spent years providing free medical treatment at the Woorabinda settlement near Rocky. He knew firsthand what he spoke about. So many of his speeches, and colleagues here could briefly imagine them, were given as part of an adjournment debate – heartfelt words delivered to empty chambers late at night. But what I think is remarkable is that those speeches could be read on adjournment tonight with only a word or two changed. It is perhaps something we should all reflect upon.

Today, another member of a famous government marches into history. We pause to honour the memory of a man of decency, humility and intellect and we offer our party and our nation's thanks to his family and his service.

Pikniko dum la ANZAK-tago

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Dum la ĉijara ANZAK-tago la adelajdanoj ekskursis. Ilia unua haltejo estis la botanika ĝardeno Wittunga en la monteta regiono. La origina posedanto de la bieno estis Edwin Ashby, ornitologo, kolektanto de papilioj kaj diversaj insektoj, konkoj, speciale ĥitonoj, pri kiuj li estis monde konata spertulo. Lia filino, Alison, evoluigis tie sian amon al indiĝenaj plantoj. Jam tre juna ŝi lernis kolekti, sekigi kaj desegni specimenojn. Ŝi faris dum sia vivo proksimume 1500 akvarelojn, multaj el kiuj estas nun vaste konataj pere de bildkartoj. Oni nomis en ŝia honoro la speciojn *Acacia ashbyae* kaj *Solanum ashbyae*.

La nomo de Douglas Mawson estas konata verŝajne al la plejmulto de Aŭstralianoj. Oni pensas pri li unue



Edwin Desailly havas sian piknikan lunĉon en Wittunga

Memortabulo sur roko el la Flinders-montaro





Paul Desailly, Charles Stevenson kaj Michael Carney kontrolas la nomon de certa planto pere de poŝtelefono

kiel Antarkta esploristo kaj sciencisto. Li ja partoprenis 3 ekspediciojn al la suda poluso, plenajn de dramaj eventoj sed ankaŭ de esplor-rezultoj. La plej gravaj datoj pri lia vivo estas legeblaj sur la memortabulo, kiu estas fiksita al roko el Flinders montaro, apud lia tombo (vidu la foton). Mawson dum pli ol 30 jaroj studis la geologion de tiu montaro kaj amaso de liaj studentoj el la Universitato de Adelajdo lernis tie de li ne nur pri geologio, sed ankaŭ pri kiel travivi en malfacilaj cirkonstancoj. Mawson mem lernis pri tio proprahaŭte. Dum sia dua antarkta ekspedicio li estis gvidanto de 3-membra grupo. La homo, kiu tiris la sledon kun manĝaĵoj, falis en glaci-krevaĵon kaj kune kun li la kompleta manĝaĵprovizo. La restintaj du sciencistoj devis reveni al la bazo. Dudek kvin tagojn daŭris la marŝo, ili manĝis siajn hundojn, malsaniĝis kaj nur Mawson travivis. Estas mirinde, ke malgraŭ la ekstremaj kondiĉoj

li kolektis tiom da informoj pri geologio, surteraj kaj enmaraj specioj, meteorologio, magnetismo, aŭroro, ke necesis 22 volumoj por publikigi ilin.

La tria ekspedicio estis brita-aŭstralia-novzelanda. Parto de ĝiaj taskoj estis mapado de la bordoj de Antarktiko. Tiuj mapoj estis poste la bazo por la establo de la Aŭstralia Arkta Teritorio.

En la honoro de Mawson estis nomitaj pluraj geografiaj lokoj, inter ili Mawson Coast kaj Mawson, la unua daŭra Aŭstralia stacio en Antarktiko. En Adelajdo estas relative nova antaŭurbo nomata Mawson Lakes. En la universitato, kie Mawson instruis, de 1959 funkcias Mawson-instituto por Antarkta esploro. Mawson ricevis OBE (Ordeno de la Brita Imperio), kavalirecon (1914), multajn honorojn de diversaj institucioj en diversaj landoj. La portreton de Mawson vi povas vidi sur la 100-dolara monbileto.

La Spuroj de Vivo

JONATHAN COOPER (GOSFORD)



Preter individua lerteco, desegnado havas profitojn alireblajn de ĉiuj, kiuj volas nove vidi.

Ĉiun semajnon, grupo da plenkreskuloj de diversaj aĝoj kaj fonoj kunvenas ĉe la konstruaĵo “Kincumber Village School of Arts” en la centra marbordo, norde de Sidnejo. Ili kunvenas por praktiki la arton desegni homfigurojn: por skizi la homan korpon, observante vivan poziston. Ĝi estas tekniko, pri kiu multaj scias, sed kiun multaj ne plene komprenas, simile al la koncepto de desegnado.

Desegni estas natura agado. Tuj post kiam ni ekscias kiel infanoj, ke ni povas fari strekojn, ekzemple en sablo aŭ sur nebula fenestro, ni tion faras. Desegnado estas esence la spuro forlasita per movado.

Sed se desegnado estas tiom natura kaj io, kion preskaŭ ĉiu

infano faras, kial plejmultaj da ni kiel plenkreskuloj ne praktikas ĝin? Ni trapasis la samajn etapojn de disvolviĝo en desegnado, samorde: hazarda skizado sekvite de regata skizado. Poste, kun kuraĝigo de plenkreskuloj, ni komencis atribui signifon al tiuj ĉi skizeroj: bukloj kun enaj makuloj fariĝis vizaĝoj, kaj linioj radiaj de ĉi tiuj “vizaĝoj” fariĝis brakoj kaj kruroj. Baldaŭ poste ni faris pli kompleksajn rakontojn per niaj bildoj. Post kiam ni vidis fotojn kaj aliajn vivsimilajn bildojn, ni provis realecigi niajn proprajn desegnaĵojn. Tio, kio poste okazis dependis de kiom da kuraĝigo ni ricevis de plenkreskuloj ĉirkaŭ ni kaj, iom, de nia natura talento. Ĉi tio ofte nomiĝas la “krizo de realismo”. Ni aŭ trarompis, kaj plibonigis niajn kapablojn plu, aŭ forlasis desegnadon, dirante al ni, ke ni ne

posedas tiun lertecon.

Bedaŭrinde, nur malgranda procento da plenkreskuloj kredas, ke ili povas desegni, kaj tial ja desegnas. Tamen desegnado estas grava aktiveco por ĉiuj. Ĝi instigas vidadon sen nomado. Kutime, kiam ni ĉirkaŭrigardas nin, ni kategoriigas aĵojn, ofte senkonscie: “Tio estas homo; tio estas arbo.” Eĉ kiam ni rigardas vizaĝon, ni kutime vidas ĝin kiel sumo da apartaj vizaĝopartoj. Tio estas grava lerteco ĉar ĝi permesas al ni fari sencon el la mondo ĉirkaŭ ni per komparo de novaj vidsentoj al similaj stokitaj en nia memoro, sen superŝarĝi nian cerbon. Sed kiam ni faras tion ni maltrafas la estetikan sperton, kiu estas vidi simple pro la plezuro de vidado. Ĉi tiuj malsamaj modaloj de observado estas foje nomataj la parola kaj neparola. Ĝenerale, la plej sukcesaj desegnaĵoj funkcias en la neparola modalo.

La parola modalo estas logika, sisekva, racia, objektiva kaj analiza (vidanta aĵojn kiel sumojn da partoj). La neparola modalo estas intuicia, nesisekva, neracia, subjektiva kaj tuteca (vidanta aĵojn kiel neapartigeblajn tutojn). Se vi iam sentis vin nesufiĉa pri desegnado, tio eble estas ĉar vi tro fidis la parolan modalon. Unu maniero por kuraĝigi la neparolan estas kopii renversitan foton de homo. La parola parto de la menso ne scios, kion fari pri tiu vida stimulo ĉar nenio aspektas konata. Tial, la neparolata povas transpreni. Interese, la desegnaĵo, kiu rezultos verŝajne aspektos pli bona ol se vi desegnus la foton ĝustadirekte.

Unu ofta demando rilate al vivkorpa desegnado estas “Kial artistoj desegnas nudojn?” La kutima respondo estas, ke por pentri vestitan homon, oni devas scii, kio estas sub la vesto.

Sed tiu klarigo evitas la evidentan demandon pri sekseco. (Desegni aliajn aĵojn, ekzemple montojn aŭ kukurbojn, ankaŭ povas esti sekse aŭ almenaŭ sense. Tamen la rilato ne estas tiom klara.)

Desegnado estas sensa agado ĉar desegni linion similas al tuŝi. Oni povus imagi, dum la kraĵono faras strekojn sur papero prezentante, ekzemple, la malgrandan truon sub la ŝultro de pozistino, ke la kraĵono vere sekvas la konturojn de tiu truo. Ankaŭ ekzistas sento, ke la artisto iel ŝtelas la privatecon de la modelo. Ĉi tio montras la paradokson en homfigura desegnado: la modelo estas kaj objekto kaj persono.

La grupo “Kincumber Life Drawing” kunvenas ĉiun vendredon inter 10:00 kaj 12:30 ĉe Kincumber Village School of Arts, apud la angulo de Empire Bay Drive kaj Tora Avenue, Kincumber. Tipa kunveno komenciĝas per kelkaj mallongaj pozoj antaŭ pli longaj pozoj inter 20 kaj 30 minutoj. La pozisto povus esti ina aŭ vira. La grupo estas akceptema kaj subtenema, kaj ampleksas multajn stilojn kaj nivelojn de sperto. Por pli da informo kontaktu Jonathan per 0403 358 941.

Bazita el artikolo verkita de Jonathan Cooper kaj Zoë Cooper, en kanada revuo CV Collective (cvcollective.ca)

Tiel funkcias mia loka registaro

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

En unu el la elsendoj de la radio 3ZZZ Heather Heldzingen legis artikolon de Hoŝino Toŝijas, publikigitan en la revuo Monato en decembro 2017, pri la 50 jariĝo de la blindulgviaj kaheloj. Mi ja antaŭe rimarkis ilin je krucvojoj sed ne sciis kial ili troviĝas tie. De post kiam mi eksciis pri la graveco de tiuj kaheloj, mia atento al ili fariĝis multe pli ofta. Mi rimarkis ke en diversaj kvartaloj de Melburno, ili ne estas prizorgitaj. Ekzemple en mia ĉirkaŭurbo Mount Evelyn apud la trafiklumoj fronte al la biblioteko, mankas la supera tavolo de kelkaj kaheloj, tiu kiu enhavas la reliefajn punktojn, do ili povas esti glitaj se pluvas. Unu havas truon. Mi konsilas al virino, kiu surportas ŝuojn kun altaj kaj maldikaj kalkanumoj, eviti trairi la straton tie. Resume la kaheloj, kies celo estas helpi blindulojn, povus kaŭzi akcidenton.

Mi decidis skribi leteron kun aldonita foto al la konsilantaro de Yarra Ranges por atentigi pri la nesekura situacio. Kelkajn tagojn poste, la 9an de februaro 2018 mi ricevis respondon kun danko: *la riparoj estas planitaj kaj estos farataj ene de du semajnoj*. Mi ĝojis pri tiu rezulto kaj forgesis pri la afero ĝis majo kiam mi iris al la supra parto de Mount Evelyn kaj konstatis ke la

kaheloj tute ne estas riparitaj.

Mi iris hejmen por preni mian fotilon kaj ĉifoje veturis al la supro de Mount Evelyn, mi ne piediris tra la arbaro.

Mi skribis duan leteron al la konsilantaro, demandante kial la kaheloj daŭre estis en tiu malbona stato. Respondo venis la 11an de majo, klarigante ke necesis mendi la kahelojn, sed la laboro estos farita ene de du semajnoj.

Mi ankoraŭ ne grimpis al la supro de Mount Evelyn por kontroli ĉu vere novaj kaheloj kuŝas nun sur la trotuaro. Se ne, ĉu pacience sendi novan leteron? Ĉu eblas fidi la konsilantaron?



La Interna Ideo

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

Pli kaj pli kun d-ro Corsetti kaj Ian Fantom mi konsentas pri la graveco de la interna ideo de Esperanto. En 1906 en Ĝenevo, la Urbo de la Nacioj kaj la sidejo de la Ligo de Nacioj, la Majstro pravege eksplikis jene.

“Ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo—vi ĉiuj sentas ĝin tre bone—estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.”

Ligo de Nacioj: <http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-125-dec2016.pdf> paĝoj 17-22

Kaj plue Zamenhof klarigis en anglalingva gazeto nomita The Christian Commonwealth la trian de Septembro 1913: Demando: *“Ĉu vi opinias, ke la ordono lerni Esperanton lastatempe donita de Abdul Baha al siaj adeptoj efikos por disvastigi la lingvon en la Oriento?”*

Zamenhof: *“Mi multe interesiĝas pri la baha movado, ĉar ĝi estas unu el la grandaj mondmovadoj kiu, simile al la nia, insistas pri la homara frateco kaj alvokas ĉiujn kompreni unu la alian kaj lerni ami sin reciproke. La bahaanoj komprenos la Internan Ideon de Esperanto pli bone ol multaj aliaj. Tiu ideo estas: ‘surbaze de neŭtrala lingvo rompi la murojn inter homoj kaj kutimigi ilin vidi en sia najbaro*

homon kaj fraton.’ Tial mi opinias, ke kiam la bahaanoj lernos Esperanton ĝia Interna Ideo estos granda morala forto, kiu devigos ilin dissemi ĝin sendepende de iliaj apartaj kredoj. Mi ĉiam spertis, ke la plej fervoraj laborantoj por Esperanto estas la konvinkitoj pri la Interna Ideo, ne la homoj kiuj konsideras ĝin nura ilo de materia profito, kvankam kompreneble ĝia komerca valoro ne estas dubebla. Multaj homoj dubis, ĉu Esperanto estos akceptita de Orientaj popoloj; mi neniam opiniis tiel. Mi estas certa, ke bahaanoj portos la lingvon en multajn lokojn kien ordinaraĵ eŭropaj propagandistoj neniam irus.”
<http://sezonoj.ru/2014/01/abdul-baha/>

Mi ankaŭ samopinionas kun doktoro Corsetti kaj sinjoro Fantom, kiuj malkaŝe skribas, ke la estonteco de Esperanto apartenas al Azio. Pri tiu kontinento simile prognozis antaŭ la unua mond-milito Abdul Baha, kiu profete aldonis, ke Ĉinio iĝos la plej sukcesa lando. Sed tiam oni ridindigis lin kiam malforta Ĉinio ĝemis sub la jugo de eŭropaj landoj. Krom ĉi supraj kialoj elstaras, miaopinie, en la nuntempo, konkretaj iniciatoj de du ĉinaj samideanoj inter aliaj:

<http://sezonoj.ru/2017/12/trezoro-10/>

<http://www.recim.org/prov/GhUrboj.pdf>

(respektive: Huang Yinbao kaj Wu Guojiang). Tial ni instigu la publikon (samkiel mi rekomendas al bahaanoj)

miksiĝi en la Esperanto-movado. Ĝi estas la plej bona rimedo ĝis nun konata por doni al ĉiuj valoron kaj respekton, ĉar ĝia celo sur fundamento de religia kaj politika neŭtraleco sen ajnaj koloniaj trajtoj estas tutmonda paco kaj lingva justeco.

Interne de Korea Respubliko, Japanio kaj Ĉinio, triangulo de aktivaj Esperanto-landoj, kie, instruante la anglan, mi pasigis jardekon ĝis 2006, mi malofte aŭdis plendon, kaj neniam de naskiĝinto de la Fora Oriento, ke la Internacia Lingvo estas tro malfacila aŭ ne reprezenta de azianoj. Tamen, tiu erara opinio, ĝenerale vortigita de unu-lingvuloj, estas ofte elbuŝigata de miaj samgentanoj el Eŭropo kaj Usono. Vizitinte Japanion, kie en lernejoj la angla estas devige instruata jam de multaj jardekoj, oni tuj konstatas la malfacilaĵojn de instruistoj kaj la konsternon de lernantoj rilate la lingvon de Ŝekspiro. Jam de preskaŭ du generacioj simila situacio ekzistas en Ĉinio kie nun la angla furoras. Proksimume 99% de la viktimoj (pardonon, tio estas lingvo-lernantoj) en ĉiu lernejo-jaro sukcese trapasas ĉiujn ekzamenojn por, kun verovo, diplomiĝi kaj ĝojigi la gepatrojn kies laborŝvito pagis mian salajron. En onta artikolo detaloj aperos pri tiu multe kosta kaj absurda situacio en kiu tiurilate rolas la universitatoj kaj eĉ la registaroj mem. Mallonge, apenaŭ unu universitatano el ĉiu deko kapablas kohere konversacii eĉ post tre multaj lernohoroj pri

la 'diabla' angla lingvo. Aliflanke, instrui Esperanton estas kvinoble pli rekompence kaj relative facile por studanto samkiel por instruisto! <http://blogs.bl.uk/european/2017/07/esperanto-as-an-asian-language.html>

Unu celo mia per kvin vojaĝoj al Japanio kaj multaj pliaj tra Ĉinio, Koreio, Vietnamio, Mongolio, Barato, Nepalo, Turkio, Israelo kaj Irano, tre helpate de la zamenhofa lingvo, estis ĝuste plibonigi rilatojn inter aziaj landoj, kies aktivistoj hodiaŭ interkomunikiĝas paradokse fidante je la gepatra lingvo de iamaj koloniistoj. Vivu do eterne la porpacaj idealoj de nia Movado, Esperantismo, kaj la Interna Ideo de Esperanto mem!

Du profesiaj raportistoj antaŭ dudek jaroj intervjuis min pri mia Esperanto-kurso en Tianjina universitato. Ili apartenas al Esperanto-teamo de dek salajrataj dungitoj de Ĉina Radio Internacia, kiu kiel organo de la ŝtato sin okupis ne nur pri instrumentadoj de Esperanto al tre okupataj gestudentoj kaj kolegaj geinstruistoj, sed ankaŭ pri tio, ke tie miaj ĉinaj kaj japanaj lernantoj neniel restis apartigitaj kaj malamikemaj pro la dua mondmilito, kiel ankoraŭ okazas ofte en Ĉinio eĉ inter gejunuloj de tiuj du fortaj landoj.

Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia, somero 1998

Memevidentas la komercaj eblecoj de Esperanto. Pruvita estas ĝia belsoneco en la bel-literaturo, kaj aparte je ties pinto en klasikaj poemoj,

samkiel ni jam demonstris la utilecon de la Internacia Lingvo por dividi humuraĵojn.

<http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-127-jun2017.pdf> (p. 24-26)

<http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-126-mar2017.pdf> (p. 19-22.)

Kial do inter ni abunde troviĝas tiuj kiuj neas aŭ ignoras homrajtajn dimensiojn pri la principo de universala helplingvo, la valoron de ĝi por protekti minoritatajn lingvojn kiel “ilo de progreso kaj evoluo de ĉiuj rasoj”?

Pro la aktuala prestiĝo de Germanio kaj Japanio, por diri nenion pri rapide kreskanta ekonomio en Barato aŭ la populareco de la portugala en Afriko, Brazilo kaj aliloke, la lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) eble atingos al ok. Ĉar administraj kostoj por aldoni lingvon tie estas eksponencie egaj kaj tial malebligas elspezojn sur kampoj de urĝaj homaj bezonoj, ni esperu, ke la naŭa lingvo de UN solvos la lingvan problemon per aldono en prudentaj stadioj de facile lernebla kaj neseksisma universala help-lingvo.

UNESKO pledas por lingvo-justeco kaj celebras la Tagon de la Gepatra Lingvo:

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2018/21st-February-2018-International-Mother-Language-Day.html#EN>

Por justmaniere pacigi la mondon mi petas vian helpon: En nia mondo pli ol ses milionoj da bahaanoj vivas. Nura tri cent el ili parolas Esperanton. Miaopinie la plej multo el

la bahaanaro, definitive preskaŭ ĉiuj el nia junularo, apenaŭ rekonas la vorton ‘Esperanto’. Rilate al tiu honta situacio mi jam artikolis en Esperanto sub la Suda Kruco kies brava redaktoro en Nov-Zelando (David Ryan) aperigis fortajn kritikojn fare de erudiciaj esperantistoj nebahaaj.

<http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-128-sep2017.pdf>

Mi do tre petas vin disdividi inter akceptopretaj bahaanoj elĉerpaĵojn el fama verko Esperantigita de Lidia Zamenhof. La graveco de la lingva principo, la instrukcioj de Abdul Baha al bahaanoj pri Esperanto kaj kortuŝaj vortoj pri la Interna Ideo troviĝas ĉe ĉapitro X sur paĝoj 163 – 166.

<http://www.bahaaeligo.bahai.de/H-tekstoj/BNE-H-enkonduko.htm>

Pri Lidia Zamenhof bonvolu turni vin al:

<http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-127-jun2017.pdf> paĝoj 16-17

Notu bone mi petas, ke la Interna Ideo ne estas deviga:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Interna_ideo

Aliflanke, gekaraj, la Interna Ideo kaj la etikaj principoj de Homaranismo konsistigas la vivcelon de L. L. Zamenhof. (Anglalingve:

http://miresperanto.com/en/david_poulson.html

En rimarkinda letero li jene priskribis Homaranismon, “*Ĝi estas ja la celo de mia tuta vivo. Por ĝi mi fordonus ĉion ofere.*” Edmond Privat - *Vivo de Zamenhof*, paĝo125.

La plej granda saniganto de la lasta jarcento?

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Kion vi opinius, se iu dirus al vi, ke nesanigebla malsano ne ekzistas? Eble vi suspektus, ke la parolinto estas aŭ freneza aŭ senmezure naiva.

Sed ja estis viro, kiu plenserioze diris tion. Li vivis en Germanio inter 1906 kaj 1959, kaj li pruvis la veron de siaj vortoj. Bruno Gröning respondecis pri la resaniĝo de miloj da homoj, kvankam li ĉiam diris, ke li mem estas nur humila instrumento kaj, ke la vera kuracanto estas Dio.

Kvankam li estis ĝisfunde Dikreda homo, Bruno ne similis al tradiciaj sanktuloj. Li fumis, li trinkis tro da kafo, li ŝatis ŝerci. Kaj li devis ripetfoje alfronti tribunalon, ĉar li kulpis pri la tiutempe granda krimo "sanigi sen licenco".

Naskite en proletara medio en la tiama germana urbo Danzig (nun Gdańsk en Pollando) en 1906, Bruno unue malamis la iom brutalan familian situacion, kie li sola ne batis siajn gefratojn. Trijara knabo, li ofte eskapis en apudan arbaron kaj amikiĝis kun la sovaĝaj bestoj (ili estis la unuaj ricevantoj de lia sanigpotenco). En tiu natura situo li sentis unuecon kun la bestoj, arboj, birdoj – kaj antaŭ ĉio kun Dio. Iam li diris al Dio, ke li ne volas esti sur tiu ĉi kruda Tero. La respondo venis: Bruno, vi elektis tiun ĉi vivon. Via tasko estos ĉiam helpi aliajn.

Kaj fakte li vivolonge helpos,



Bruno Gröning

sed unue kaŝe. Li sanigis parencojn, konatojn, kaj aliajn, sed ne volis, ke la mondo eksciis pri tio. Li travivis eble la plej violentan epokon de la monda historio, tiun de la du hororaj mondmilitoj. Li laboris en humilaj postenoj kaj konatiĝis kun multaj tavoloj de la tiama socio. Li eĉ devis soldatiĝi dum la Dua Mondmilito, kvankam li tuj diris, ke li alpaŝus nenian homon. Li estis malliberulo en soveta militkaptitejo, kie oni traktis la germanajn malliberulojn same kiel la



germanoj estis traktintaj alinaciulojn: brutale. Sed Bruno povis multe helpi siajn kamaradojn.

Postmilite li ne plu havis hejmurbon – Danzig iĝis intertempe Gdańsk kaj la germanoj estis elpelitaj. Li migris al la okcidenta parto de Germanio, tiutempe regata de usonanoj, britoj, kaj francoj. Ankaŭ tie li sanigis sed volonte restis for de publika atento. La turnopunkto okazis en la vestfalia urbeto Herford.

Tie loĝis inĝeniero Hülsmann, kies naŭjara filo Dieter ne povis eĉ eksidi en lito pro progresanta muskoltrofio. Neniu kuracisto povis helpi. La malespera patro aŭdis onidiron pri Bruno Gröning kaj petegis Brunon veni. Bruno akceptis la inviton kaj simple parolis al la knabo, kiu iom poste ellitiĝis kaj piediris, iom

stumble sed sen helpo de aliaj. La patro, -kontraŭ la deziroj de Bruno, kiu tamen sciis, ke venis lia tempo – alvokis ĵurnalistojn kaj disanoncis la “miraklon”.

En la tiama Germanio, en 1948, estis amaso da malsanaj homoj, viktimoj de la bombardado kaj pafado dummilitaj, sed ankaŭ homoj kies kunlaboro kun la hitlera reĝimo hantis ilin. Homamasoj ekiris al Herford, ne nur el Germanio sed ankaŭ el aliaj landoj. Blinduloj ree vidis, lamuloj ekmarŝis, surduloj ekaŭdis, suferantoj de vasta gamo da malsanoj iĝis sanaj. Bruno Gröning estis la sensacio de la radio kaj ĵurnalprogramoj. Kinejaj novaĵbultenoj – la antaŭirantoj de televido – temis pri “la mirakla kuracisto”.

Sed tiu famo ne plaĉis al profesiaj kuracistoj, nek al farmaciaj kompanioj. Bruno ĉiam volis bonajn rilatojn kun kuracistoj: “Se vi fidas vian kuraciston, tiu fido estos la bazo de via saniĝo”, sed la mirigaj sukcesoj de “amatoro” vekis eĉ kuracistoj ne nur ĵaluzon, sed eĉ timojn, ke de la medicinista rolo ne plu necesos. Uzante la pretekston, ke la homamasoj obstaklas la trafikon en Herford, la loka magistrato, premate de kuracistaj asocioj, malpermesis al Bruno sanigi.

Do li iris aliloken kaj ĉie la hordo de malsanuloj sekvis lin, ĝis la tiea magistrato malpermesis lian agadon. Dum kelka tempo li rajtis agi en Bavario, kaj tie, apud Rosenheim sur ĉevalbreda bieno nomata Traberhof, okazis scenoj kvazaŭ el la Biblio. Ĝis 30 000 homoj iris tage tien, kaj

la nekompreneblaj sanigoj daŭris. Ĝis fine la malamikoj sukcesis instigi ankaŭ la bavaran provinc-registaron malpermesi la agadon, kiu “povus kaŭzi histerion inter simplaj homoj”.

Kaj kiaj estis la ideoj, per kiuj Bruno atingis siajn nekredeblajn rezultojn? Li diris, ke la natura stato de homo estas klara ligo al Dio, laŭ kies plano nia vivo estu sana, feliĉa, kaj kreema. Se ial ni ne estas en tia bona stato, necesas nur trovi tiun ligan al Dio. Ĉar Dio decidus ĉion, per Lia forto eblas transformi eĉ onidire nesanigeblan staton en bonfarton.

Bruno rifuzis akcepti monon por siaj servoj, sed foje liaj helpantoj ne rezistis la tenton: multaj homoj pretis pagi grandajn sumojn, kredante ke tiel ili aĉetos sian sanon. Plurfoje Bruno devis peti tian malfortvolan helpanton foriri, kaj kelkaj el ili iĝis liaj malamikoj. Pere de iliaj “atestoj” la kuracistaj asocioj procesis kontraŭ la malgranda viro, kies sola deziro estis helpi. La lastaj jaroj de lia mallonga vivo estis speco de krucumiĝo.

Kiam Bruno mortis en 1959, ŝajnis, ke lia agado estis vana. La asocioj kun lia nomo unu post alia malfondiĝis. Sed en la 1970-aj jaroj unu el liaj adeptinoj, Grete Häusler, restarigis la Bruno-Gröning-Amikaron, kiu estas nun mond vasta asocio. Cetere, kvankam la ĉefa lingvo de la Amikaro estas la germana, ĝi uzas multajn aliajn lingvojn, inter ili Esperanton (kun diverslandaj kolegoj mi daŭre tradukas “sukcesraportojn”, pri saniĝoj, kies kaŭzon kuracistoj ne povas klarigi laŭ kutimaj konceptoj).

Tiuj sukcesraportoj nun nombras



dekojn da miloj. Ili venas el ĉiuj partoj de la mondo. El la dekmiloj mi elektu nun unu, kiu bone konfirmas la diiron de Bruno, ke nenio estas nesanigebla.

Pavel Ŝemet estis juna sportema viro, kamionŝoforo de arma divizio bazita en Ĉernobil. Kiam okazis la katastrofo tie en 1986 Pavel kaj multaj aliaj viroj estis sendataj sen sufiĉa protekto “ordigi” en la nuklea reaktoro. Post nelonge ĉiuj krom Pavel estis mortintaj pro radiado aŭ sinmortigis pro deprimiĝo.

Unue ŝajnis, ke Pavel havas nur haŭtveziketojn. Sed lia cerbo estis atakata. Lia stato daŭre malpliboniĝis, kaj en 1987 li devis ekŝiĝi el sia ŝofora posteno, kaj baze li pasigis la jarojn 1987 ĝis 1993 en

hospitalo. En 1993 oni forsendis lin el la hospitalo, ke li mortu hejme. Li apenaŭ povis sin movi, daŭre havis internajn dolorojn, apenaŭ povis ion ajn digesti, ofte senkonsciiĝis, kaj perdis la memorpovon. Kuracistoj taksis, ke li vivos maksimume 2 – 3 monatojn.

Lia edzino Tatjana malesperis. Sed ŝi aŭdis, ke venos el Germanio kuracisto, kiu parolos pri la ideoj de Bruno Gröning. Tatjana neniam aŭdis pri Gröning, sed ŝi pretis provi ion ajn. Ŝi lernis pri la teĥniko eniri tre

senstreĉan staton de korpo kaj animo kaj malfermi sin al la enfluo de dia energio. Tatjana fervore faris tion ĉiumatene kaj ĉiuvespere kaj petis helpon por Pavel.

Je ĉies surprizo Pavel tuj montris pliboniĝon de sia stato. Lia bona sano iom post iom revenis, kaj post du jaroj li povis plene ĝui sian antaŭan vivon de ŝoforo kaj sportemulo.

Neniu kuracisto povas klarigi tion.

Pliaj informoj troveblas ĉe www.bruno-groening.org/english

Vorta ŝtuparo

DONALD ROGERS (NOV-ZELANDO)

Vorta ŝtuparo (ankaŭ nomita angle *doublets* aŭ *laddergrams*) estas vortludo inventita de Lewis Carroll (Charles Lutwidge Dodgson). Vorta ŝtuparo komenciĝas per du vortoj, kaj por solvi la enigmon, oni devas trovi ĉenon de aliaj vortoj por ligi la du vortojn, en kiu du apudaj vortoj diferencas per unu litero.

Lewis Carroll inventis la ludon en 1877 kaj nomis ĝin *Word-links* (vortligiloj), kaj priskribis ĝin kiel ludo por du ludantoj. Tamen unu homo povas ludi ĝin sole. Poste Carroll ŝanĝis la nomon al *Doublets* (duopoj).

Se ludas du ludantoj, iu ludanto elektas komencan vorton kaj finan vorton. La alia ludanto celas ŝanĝi la komencan vorton al la fina vorto en serio da paŝoj, kreante ekzistantan vorton por ĉiu paŝo, anstataŭigante unu literon. Iuj variaĵoj de la ludo permesas al la ludanto interŝanĝi du literojn. Ofte oni kreas vortan ŝtuparon por du vortoj inter kiuj ekzistas ia rilato (sinonimoj, antonimoj, semantike rilataj vortoj, ktp).

En iuj okazoj oni trovas solvon en la minimuma nombro da paŝoj laŭ la nombro da malsamaj literoj.

Ekzemple, por RUSA → DANO en kvar paŝoj:

RUSA → RASA → RASO → RANO → DANO

Aliflanke, KOREA → ITALO bezonas 7 paŝojn por 5 literoj.

KOREA → KOREO → KORKO → KIRKO →
KIRLO → KIALO → TIALO → ITALO

Provu ĉi tiujn ekzemplojn

Jen iuj vortparoj por kiuj legantoj povas serĉi ŝtuparojn:

TRI → DEK (en 5 paŝoj)

TRI → SES (6)

HIDA → BONA (6)

MONO → RIĈA (5)

NOVE → OLDA (6)

HUNDO → TIGRO (7)

HUNDO → AZENO (7)

VARMO → FRIDA (7)

DRAKO → ZEBRO (11)

Por solvoj iru al puzzlefoundry.com > elektu Esperanton > unikaj funkcioj > vorta ŝtuparo, kaj enigiu la vortparon serĉotan.

Solvi vortajn ŝtuparojn per komputilo

Donald Knuth, usona komputikisto, uzis komputilon por studi vortajn ŝtuparojn por kvinliteraj vortoj. Li trovis kvinliterajn vortojn la plej interesaj. Pli longaj vortoj estis

malpli interesaj ĉar relative malmultaj paroj da vortoj estas ligeblaj en vorta ŝtuparo. Knuth uzis liston de 5757 kvinliteraj anglaj vortoj, sen personaj nomoj. Li konstruis grafikaĵon de la eblaj ligoj inter tiuj listigitaj vortoj. Li trovis, ke plejmultaj vortoj ligiĝas al aliaj vortoj, kaj li ankaŭ trovis ke 671 vortoj en la listo ne estas ligeblaj kun iu alia vorto en la listo. Li nomis tiajn vortojn *aloof* (apartaj), ĉar *aloof* mem estas tia vorto.

La solvoj troveblaj de komputiloj dependas de la vortlisto kiun ili uzas. La tezaŭro de PuzzleFoundry enhavas pli ol 25000 esperantajn vortojn kaj ĉirkaŭ 2400 el ili havas kvin literojn.

Referencoj

<https://puzzlefoundry.com/UniqueFunctions> solvilo por vortaj ŝtuparoj en Esperanto, la afrikansa, angla, germana kaj hispana lingvoj.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/](https://eo.wikipedia.org/wiki/Vorta_%C5%9Dtuparo)

Vorta_%C5%9Dtuparo

Vorta ŝtuparo

Anoncoj

La 103-a Universala Kongreso en Lisbono, Portugalio

28an de Julio -4an de Aŭgusto 2018.

Temo: *Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?*

La 22-a Ekumena Esperanto-Kongreso

(70-a kongreso de IKUE kaj 68-a kongreso de KELI)

6. - 13. 8. 2018, Poděbrady, Ĉeĥio

<http://www.ikue.org/kong2018/alighilo2018.pdf>

La 2019-a Kongreso kaj Somerkursaro okazos en Adelajdo.

Ejo: Seymour College, 546 Portrush Road, Glen Osmond, SA 5064

Datoj: Vendredon 4an – Dimanĉon 13an de Januaro 2019.



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Dave Dewar | Assistant Secretary

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.